

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Vi aŭdas la kvaran prelegon pri tiu temo.

Ni vidis dum nia lasta prelego, kiel formiĝis dum la deksepa, deksepa kaj dekoka jarcentoj internaciaj kutimoj, kiuj humanigis kelkajn aspektojn de la militado.

Dum la dekoka jarcento juristoj sentis la bezonon kodigi tiujn kutimojn. La unuaj grandaj teoriistoj de la naskiĝanta internacia publika juro estas du svisoj : Emer de Vattel el Neuchâtel kaj Jean-Jacques Rousseau el Ĝenevo. Oni povas pensi, ke la vivo en malgrandaj landoj, kie renkontiĝas du juraj sistemoj, favoris la elpensadon de internacia juro. Francio konis la romian juron, Germanio kaj la svisaj kantonoj la ĝermanan juron. La princlando Neuchâtel kaj la protestanta respubliko Ĝenevo praktikis jurajn kutimojn, kiujn influis ambaŭ sistemoj.

Emer de Vattel naskiĝis en 1714 en vilaĝo de la princlando Neuchâtel. Li estas aŭtoro de rimarkebla Traktato pri la internacia publika juro : « *Traité du droit des gens* » (Taktato pri la rajto de la homoj). Tiu verko estis eldonita en 1773. Ĝi certe multe influis la redaktadon de la Deklaracio de la homrajtoj de 1789. Dank'al la laboro de la fama neŭŝatela teoriisto la jura doktrino subite plifortigis, per sia aŭtoritato, humanajn kutimojn, kiuj ĝis tiam estis nur sporade kaj regione observitaj dum konfliktoj.

Jen kelkaj diroj de Emer de Vattel, kiuj koncernas nian temon :

*“Pro la fakto, ke via malamiko estas malarmita kaj kapitulaciis, vi ne plu posedas rajtojn koncerne lian vivon, kondiĉe ke li ne meritas mortigon kiel punon pro krimo.”*

*“Oni devas memori, ke militkaptitoj estas homoj kaj malfeliĉuloj.”*

*“Se via malamiko estas iam venkita, ĉu necesas, ke li neeviteble mortu pro siaj vundoj.”*

En tiu lasta citaĵo Emer de Vattel sin prononcas kontraŭ la uzo de venenigitaj armiloj. En la aliaj li samopiniis, kiel la franca reĝo Ludoviko la dekkvina, kiu diris sur la batalkampo Fontenoy en 1745: *“Pro la fakto, ke niaj malamikoj estas vunditaj, ili ne plu estas niaj malamikoj.”*

La verkaro de Emer de Vattel ludis fundamentan rolon por la formiĝo de internacia publika juro. Unu el la zorgoj de Ruĝa Kruco estos devigi ĉiam pli precizan formuligon de tiu juro por povi poste pli precize kontroli ĝian respektadon.

Jean-Jacques Rousseau naskiĝis en 1712 en Ĝenevo, do nur du jarojn antaŭ Emer de Vattel. En la sama spirito kiel la neŭŝatela juristo li formulis sian faman teorion pri la milito, tio en la verko « *Le Contrat social ou principe de droit politique.* » [*La Socia Kontrakto aŭ principo de politika juro.*] Tiu verko estis eldonita en 1762. Ĝi ne nur influegis la francajn revoluciulojn, kiuj donis al la mondo la Deklaracion de la homrajtoj, ĝi ankaŭ naskis iun koncepton de la ŝtato kaj tiel aŭtomate havas konsekvencojn koncerne al la homo. Rousseau kredas, ke lia teorio pri milito estas bazita sur racio. Ni hodiaŭ komprenas, ke ĝi estis bazita sur dogmoj, kaj ĉefe sur la dogmo de la absoluta suvereneco de la ŝtatoj, unu el la dogmoj, kiu ankoraŭ kaŭzas plej da pov-ekscesoj. Kiel vi rimarkos, la teorio de Rousseau estas ankoraŭ aktuala. Se ĝi ŝajnas kritikenda, tio estas, ĉar la dogmon ni ne plu blinde povas akcepti. Mi donas la parolon al Rousseau :

*« La milito ne estas rilato de homo al homo, sed rilato de ŝtato al ŝtato, en kiu la individuoj estas nur akcidente malamikoj, kaj tio ne kiel homoj, eĉ ne kiel civitanoj, sed kiel soldatoj. »*

*« La fino de la milito estante la detruon de la malamika ŝtato, oni rajtas mortigi la defendantojn, tiom longe kiam ili havas armilojn enmane, sed tuj kiam ili demetis ilin kaj*

*kapitulaciis, ĉesante esti malamikoj aŭ instrumento de la malamiko, ili refariĝas simple homoj, kaj oni ne plu rajtas atenci ilian vivon. »*

La laboro de Ruĝa Kruco dum unu jarcento alportos grandan baton al tiu koncepto de la ŝtato, kaj do de la milito. La diroj de la ĝeneva filozofo verŝajne jam ne povis kontentigi la fondintojn de la homarana movado Ruĝa Kruco ; hodiaŭ ili sonas strange al niaj oreloj. Sed se oni bone pripensas, oni rimarkas, ke ili lumigas multajn aspektojn de nia hodiaŭa societo, kie homoj, kiuj ne havas kaŭzon sin malami, tamen subite je iu ordono sin konsideras kiel mortigendajn malamikojn.

*« En tiel trista mondo, kiel diris doktoro Schweizer, Ruĝa Kruco reprezentas la veron, ke la homo estas vokata senti, pensi kaj agi kun la kompato kaj la oferemo, kiuj trovas sian fundamenton en lia naturo, kaj ke la popoloj, asocioj de homaj estaĵoj, havas la devon sin kondukti same. Ruĝa Kruco nin rememorigas tiun idealon, al ni, kiuj ĝin konas kaj ĝin tiel malmulte fidelas. Ruĝa Kruco nin kuraĝigas deziri por la estonto alian mondon, ol tiun en kiu ni vivas. Ni profunde honoru tiun, kiu lumigis lumturon, kiu brilas en niaj tenebroj. Al ni prizorgi, por ke ĝi ne estingiĝu. »*

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Se vi deziras aŭdi la sekvontajn prelegojn pri tiu ĉi temo, tiam ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-